

La Nobel-premiitoj : Centa datreveno de la naskiĝo de la Nobel-pacpremiito
Albert Schweizer, 7-a parto. Frédéric Passy, 3-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 595, 1975.03.05 & 08

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Okaze de la jubileo Albert Schweizer ni prezentas al vi historieton de la Nobel-pacpremiitaro. Vi aŭdas la sepan prelegon de tiu serio.

A.- Ni prezentis al vi la personecon de la pariza ekonomiisto Frédéric Passy, kiu fondis en 1867 la organizaĵon Internacia kaj Konstanta Ligo de la Paco.

Cl.- Tiu organizaĵo havis efemeran vivon. La milito de 1870-71 inter Francio kaj Prusio ĝin silentigis.

A.- En 1873 en klimato, kiu igis malfacila ĉian porpacan agadon, ĉar la sinteno de la francoj estis al la venĝo kontraŭ la venkontaj germanoj, Frédéric Passy kaj liaj amikoj tamen ne hezitis rekomenci la interrompitan laboron. Sub la nomo **Franca Societo de la Amikoj de la Paco** (**Société française des Amis de la Paix**) ili kreis konstantan agad-centron, kies sekretario estis Frédéric Passy mem.

Cl.- Tiu Societo de la Amikoj de la Paco publikigis manifeston titolitan **Revenĝo aŭ Releviĝo** (**Revanche ou Relèvement**). Kelkaj principoj estis klare esprimitaj : ĉiu homo aŭ popolo apartenas nur al si mem. Neniu rajtas disponi pri ĝia sango kaj ĝia teritorio. Ekzistas solidareco inter la popoloj, kiu devas esprimiĝi per la arbitraciado de la internaciaj konfliktoj. Arbitraciado estas la agnosko de tiu ĉi granda vero, ke neniu povas esti samtempe juĝanto kaj partiano. La leĝoj, kiuj valoras por la rilatoj inter la homoj, ankaŭ valoras por la rilatoj inter la regnoj. Sekurecon neniam povas alporti milit-preparo. La respekto kaj disvolviĝo de la internacia juro kaj la kreo de apelaciaj arbitraciaj kortumoj estas la nura vojo al komuna sekureco, la plej taŭga protekto de la malfortuloj kaj la plej vera honoro de la fortuloj. Kie la materiala potenco kreskas, tie estas necese, se oni ne volas nutri la malbonon per armiloj ĉiam pli teruraj kaj false sekuraj, ke la morala potenco samtempe kresku, kaj ne nur tiom, kiom ĝi, sed pli ol ĝi,

A.- Dum 15 jaroj Frédéric Passy kaj liaj amikoj laboris en la nekonateco. Sed, kiel ni havas la okazon montri, ilia laboro ne restis vana. Ĝi kondukis al la famaj Konferencoj de la Paco, kunvokitaj de la rusa imperiestro Tsaro Nikolao, kies rezulto estas la Konstanta Arbitracia Kortumo.

Cl.- Jen kiel disvolviĝis la aktiveco porpaca, kiun grandparte gvidadis aŭ orkestradis Frédéric Passy :

A.- La Societo de la Amikoj de la Paco baldaŭ transformiĝis el **Societo por la Internacia Arbitraciado**, en la franca lingvo : **Société française pour l'arbitrage entre nations**. Ĝi kunlaboris kun similaj naciaj organizaĵoj, kiuj estis kreitaj en Britio, Usono kaj aliaj landoj. **Instituto de Internacia Juro**, en la franca : **Institut de Droit international** estis fondita en 1872 en Bruselo. Ĝia sidejo troviĝis en *Gand*, kiam en 1904 ĝi ricevis la kvaran Nobel-pacpremion. La parlamentanoj el diversaj landoj, kiuj opiniis, ke arbitraciado devas anstataŭi militadon por la solvo de la internaciaj konfliktoj, aliĝis al **Internacia Unuiĝo de Parlamentanoj**, en la franca : **Union interparlementaire**. Fine estis fondita en Berno

Internacia Oficejo de la Paco, en la franca **Bureau international de la Paix**, kies du unuaj direktoroj, Elie Ducommun kaj Charles Albert Gobat, ricevis la duan Nobel-pacpremion en 1902. Tiu Oficejo de la Paco kunordigis la laboron de pli ol 800 porpacaj organizaĵoj. Ĝi eldonis tre gravajn studojn kaj fundamentajn verkojn. Ekde 1889 okazis ĉiujare Universala Pac-Konferenco. Tiu renkontiĝo grupigis plurajn milojn da kunvenantojn, inter kiuj multaj sciencistoj, juristoj, verkistoj, edukistoj, komercistoj, politikistoj, ktp. Kongreso de parlamentanoj ĝenerale disvolviĝis ĵus antaŭ aŭ post tiu gravega pac-kongreso.

Cl.- La nomo de Frédéric Passy estas intime ligita al la historio de ĉiuj organizaĵoj, kies nomojn ni ĵus menciis. Plurfoje li eĉ prezidis la packongresojn.

A.- Kiam oni ekzamenas la protokolojn kaj raportojn de la pac-organizaĵoj, oni konstatas, ke ili koncentrigis la laborfortojn de la elito de la fino de la 19-a jarcento. Antaŭ la unua mondmilito renkontiĝis en pacmanifestacioj homoj tre malsimilaj : tio favoris la dialogon. Hodiaŭ tiu dialogo ne ekzistas plu. La registaraj organizaĵoj grupigas fakulojn kaj politikistojn, dum la pac-organizaĵoj arigas diletantojn. Tiel ne estis dum la epoko de Frédéric Passy.

Cl.- Frédéric Passy estis eknomiisto. Fakte lia porpaca laboro estis ĉefe orientita al juraj aktivecoj. Tio tamen ne malhelpis Frédéric Passy interesiĝi pri aliaj porpacaj aktivecoj. Kiel esperantistoj ni deziras scii, ĉu la mondlingva demando kaptis lian atenton. Ni povas jese respondi. En 1885, du jarojn antaŭ la naskiĝo de esperanto, oni trovas enkondukan leteron de Frédéric Passy en volapuk-lernolibro publikigita de August Kerckhoffs sub la titolo *La langue commerciale universelle (la Universala Komerca Lingvo)*. Por homo kiel Frédéric Passy nenio, kiu povis havi pozitivan influon favore al la kuniĝo de la homaro, restis fremda.

A.- Sed por Frédéric Passy mondlingvo, malarmado, kaj ĉiuj ceteraj celadoj fine sukcesos, nur se antaŭe progresos la internacia arbitraciado, sola rimedo kapabla foje ĉesigi la armitajn konfliktojn.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!